**PILO-PRESS**
Interncia Informservo

Jarabono 1973
20,-- GM
*************
Bonvolu uzi la almetitan poŝtan pagilon !
**************

**Eldonanto/Herausgeber:**
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 37/1972 21 nov 72
Aperas ĉiusemajne



Scheel, Walter,



Brandt, Willy,

## Popola decido por Willy Brandt kaj Walter Scheel

Bonn (PP). La voĉdonrajtaj civitanoj de Federacia Respubliko Germanio faris sian decidon la 19 nov 72. 91,2 % de la voĉdonrajtigitoj uzis sian rajton decidi kiu registaro en Bonn havu la respondecon por la venontaj kvar jaroj. 54,3 % donis sian voĉon por la daŭrigo de la politiko de la ĝisnuna koalicio SPD-FDP.

La provizora fina rezulto montras jenajn pocentaĵojn:

| | 1972 | (1969) |
|---|---|---|
| CDU/CSU | 44,8 % | (46,1) |
| SPD | 45,9 % | (42,7) |
| FDP | 8,4 % | ( 5,8) |

Ĉiuj aliaj partioj, inkl. NPD kaj DKP, restis sub 1 %.

Laŭ tiu rezulto la nova registaro Brandt-Scheel nun havos stabilan plimulton en Bundestag . La tri partioj havos jenajn mandatojn en la parlamento:

| | 1972 | (1969) |
|---|---|---|
| CDU/CSU | 224 | (242) |
| SPD | 230 | (224) |
| FDP | 42 | ( 30) |

******************************************************

## La Loka Kongresa Komitato de la 59a UK



Regierungsdirektor Dr. Werner Bormann, Hamburg

Hamburgo (LKK) La Loka Kongresa Komitato de 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo, FRG, (27.7. - 3.8.1974) fondiĝis kaj estis oficiale registrita. Ĝiaj gememb̂roj estas:
D-ro Werner Bormann, prezidanto, Schärstr. 26 D-205 Hamburg 80, Tel. (0411) 7384508
S-ro Hans Schütt, vicprezidanto; S-ro Heinrich Wielgus, sekretario; S-ro Milan Sudec, kasisto; S-ino Elsbeth Wielgus,protokolo, artaj aranĝoj; S-ino Hella Lanka, loĝado; S-ino Ellen Eggers, ekskursoj; S-ro Holm Sörensen, junularaj aferoj; S-inoj Elfriede Blasius kaj Luisa Hoffmann, infana kongreseto; S-ino Elsbeth Bormann, enlanda informado; d-ro Artur Bormann, eksterlanda informado; S-ro Karl-Heinz Hoffmann, blindulaj aferoj; kromaj membroj S-ino Elfriede Sudec; S-roj Erner Bernhardt, Otto Hauser, Josef Kühnel. La kongresejo estos la novkonstruita moderna kongres-centro de Hamburgo: CCH Congress-Centrum Hamburg.

Nova Esperanto-Intensivkurso

Paderborn (PP) Post la sukcesa intensivkurso por Esperanto ĉe la Universitato Bielefeld la Landa Sekcio NRW de Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj anoncas novan tian kurson ĉe la Altlernejo Paderborn de la 3 - 8 jan 72. Oni denove instruos Esperanton al geinstruistoj en lingvo-laboratorio.

Esperantokurso por instruistoj en Malsupra Saksujo

Hanovro (PP) Laŭ informo de la Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj (AGEI), landa sekcio Malsupra Saksujo la ministro por kulturaj aferoj por Malsupra Saksujo aprobis denove Esperanto-kurson en la kadro de la malsupra instruista klerigado. La kurso okazos de la 13 ĝis 19 maj 1973 en St. Andreasberg.

La celo de la kurso estas:

1) Lernado de Esperanto laŭ modernaj metodoj
2) Profundigo de jamaj scioj
3) Esperanto-instruista ekzameno laŭ internaciaj kriterioj.

Ĉiuj kostoj por la malsupra-saksujaj instruistoj pagos la ministerio. La docentoj kaj kursgvidantoj ricevos honorariojn.

*************

Ekzemplo de fuŝado

Hamburgo (PP) Elstara ekzemplo de fuŝado nomis d-ro Werner Bormann, prezidanto de la LKK por la 59-a Universala Kongreso 1974 en Hamburg, la leteron de s-ro Wetterstein al kanceliero Brandt pro speciala poŝtmarko okaze de la kongreso. La zorge planita procedo, turni sin per bonega argumentado kun aldonita filatela materialo per konatoj al la poŝtministro kaj de tie, de la pinto, al la koncernaj oficistoj, estas nun detruita. La nekvalifikita propono faris nian deziron priridita diletantaĵo kaj forrabis dekomence la seriozecon. Estas facile imagi, kiun estimon pri Esperanto ni enplantis en la oficisto. Ree ni perdis reputacion. Kiel diras la "principaro de Frostavallen":

"La eraroj en la informado malproksimigas de Esperanto dekmilojn da personoj kaj kaŭzas fortan kompromitiĝon de la movado en multaj medioj".

**************

Eldonaĵoj el Pekino

"El Popola Ĉinio" la Esperanto-revuo el Pekino fariĝas pli kaj pli ŝatata Esperanto-revuo en la Federacia Respubliko La revuo trovas pli kaj pli da abonantoj. Por la novaj abonantoj 1973 la libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo eldonis grandformatan, belaspektan kalendaron 1973. Sur 12 folioj oni vidas ĉinajn pejzaĝojn, lagojn, riverojn kaj urbojn. Dum la lasta tempo aperis serioj de poŝtkartoj pri diversaj temoj: Ruĝa Signal-lanterno; Ŝagiabang, revolucia moderna pekinopero; Gingganĝan; Historiaj Restaĵoj Elterigitaj en Ĉinio; Jan'an; Ruĝa Virina Taĉmento; Ŝaŭŝan. Prezo por ĉiu serio -,80 GM.

Ekzamenoj de GEI

Augsburg (PP) La Germana Esperanto-Instituto aranĝos la 28an de decembro 1972 dum la Internacia Seminario de GEJ en Jugendhof im Bessunger Forst ĉe Darmstadt superan ekzamenon pri lingva kapableco. Sin-anoncoj por allaso al la ekzameno oni sendu al Germana Esperanto-Instituto, Fakestro por ekzamenoj, Gerald Tucker, 89 Augsburg, Trettachstr. 34. Sub tiu adreso oni povas peti informojn pri la ekzamenkondiĉoj. Kandidatoj sub 25 jaroj kaj studentoj povas partopreni en la lotumado de premioj laŭ la Berendsohn-konkurso ( 500,-; 300,- kaj 200,- GM)

Zamenhof-festo en Duisburg

Duisburg (PP) Ni denove atentigas pri la Zamenhof-festo 1972, la 10-an de decembro 1972, de la 10a - 22a horo, en Duisburg, gastejo "Neudorfer Hof", Neudorfer Str. 31-33, tujapude de la ĉefa stacidomo. La Zamenhof-festo estas komuna arangô de REVELO, GEFA kaj SAT.
La programo antaûvidas prelegojn pri la IFEF-kongreso en Lugano, kun lumbildoj, pri Esperanta kulturo de H. Trunte, pri la UK en Portland de Günther Becker kaj pri "Esperanto - sporta lingvo" de ambasadoro Ralph Harry kun persone fotita filmo "Olimpiaj Impresoj".

**************

La semajno en la radio (PP)

Romo. La ĉi-dimanĉa elsendo almenaû estis kaptebla kaj aûdebla. Oni parolis pri la "oblikva turo" de Piso kaj la akvo-mastrumado en Italio. La Kuriero de Esperanto estis relative mallonga. Oni parolis ĉefe pri Esperanto en italaj popolaj lernejoj kaj la bona ekzemplo de Trento.
Berno. Ges-roj Gacond daûrigis siajn rememorojn pri E. Privat, ĉi-foje parolante pri ekspozicio nuntempe okazanta pri E. Privat. - A. Baur prelegis pri nova faksimila libro de Konrad Gesner, svisa naturesploristo (1516 - 1565). - Pekino. Jam estas kutimo aûdi dum la pekinaj elsendoj pri novaj politikaj gastoj ĉiusemajnaj, ĉi-foje el Nepalo. Oni raportis ankaû pri la vizito de la viceministro ĉina por eksteraj aferoj en Parizo, kaj pri aliaj aktualaj politikaj problemoj.
Varsovio. La elsendo lunda de la 20 nov 72, je la 16,30 h estis sub la impreso de la rezultoj de la balotoj por Bundestag en Bonn. Dum mi tajpas ĉi tiujn liniojn la radio ĵurnalo raportas pri la provizora finrezulto laû kiu venkis la ĝisnuna koalicio. Oni konstatas ke tiu venko ŝuldiĝas al la nova orienta politiko kaj al la personeco de Willy Brandt. Ankaû la ĉi-taga aktuala komentario estis dediĉita al la Bonnaj balotoj sub la titolo: "En Eûropo post la balotoj en Federacia Respubliko". El la komentario aûdiĝas la kontento pri la rezulto de la pola publika opinio. - La pola ĉefministro kaj ministro por eksteraj aferoj sendis gratultelegramojn al Willy Brandt resp. al Walter Scheel. - En la koncerto por bondeziroj aûdiĝis unuafoje Luksemburgia voĉo, Robert Hoegener el Esch-sur-Alzette. - La E-Ekspreso donis valorajn impulsojn sur sporta kaj libro-merkata kampoj, sed pro spacomanko ni nur povas paroli pri tio en venonta PP-numero. Oni aûdis intervjuon kun Pilo-Press-eldonanto L. Pickel.




GLUSTELO por aûtomobiloj ktp 1 ekz. = 1,-- GM
********
Varbu kaj informu pri Esperanto
per la supra glustelo sur via aûtomobilo!

Glumarkoj

Aliĝu al la Esperanto-kongresoj 1973




Eûropa Esperanto-Kongreso
Pentekoste 1973 en Luksemburgo
1 Folio kun 10 markoj = -,60 + -,25 Afranko
5 Folioj 3,-- GM
10 Folioj 5,50 GM





58-a Universala Kongreso de Esperanto
1973 en Beogrado, Jugoslavio

1 Folio kun 10 markoj = -,60 GM
+ -,25 GM por afranko

Informojn pri la 58-a Universala Kongreso
de Esperanto donas la germana peranto
Ludwig Pickel, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113
*******************************************

LA GLUMARKO DE LA JARO




Internacia Librojaro 1972

1 Folio kun 16 markoj = -,40 GM
+ -,25 GM por afranko

Mendu ĉe Ludwig Pickel, Libroservo, 85 Nürnberg 1,
Postfach 2113
PSchK Nürnberg 2144 96 - 855
Stadtsparkasse Nürnberg 1.960.149